

STARTO ★

ORGANO DE ĈEA ESPERANTO-ASOCIO 1976 3(55)

A
L
V
O
K
O



A
L
Ĉ
I
U
J

La Tutmonda Paĉkonsilantaro lanĉis la novan Stokholman alvokon, kiu sin turnas al ĉiuj registaroj, parlamentoj, politikaj partioj, sindikatoj, kulturaĵ kaj aliaj organizaĵoj kaj unuopaj civitanoj, ke ili unuigu en vasta internacia ofensivo por ĉesigi la armad-konkuron, kiu malfermus senprecedencajn perspektivojn por atingo de la tuthomaraĵ celoj.

La publika opinio povas ludi tiurilate rimarkinde gravan rolon. Ankaŭ la esperantistoj ne rajtas neglekti la grandan revon de la kreinto de Esperanto, kiu tiel arde aspiris la pacon kaj homan fratecon. Neniu el ili povas resti indiferenta, se temas pri paco aŭ milito. Neniu el ili rajtas rifuzi pro ideologiaj, religiaj, naciaj aŭ politikaj pretekstoj partoprenon en tiu grandioza batalo por evitigi la danĝeron, kiu minacas la homaran kulturon kaj civilizacion. Ero de tiu ĉi nuntempa kulturo estas ankaŭ la internacia lingvo Esperanto, la internacia movado por disvastigo de Esperanto.

En landaj kaj internaciaj forumoj por ĉesigo de la armad - konkurado ankaŭ la esperantistoj devas alporti sian kontribuon.

/ Laŭ La Pacaktivulo/

PROGRAMO DE ĈIUFLANKA IMPETO

Jam tridek jarojn Ĉeĥoslovakio konstruas la socialismon. Tamen komparante tiujn jarojn kun la progreso farita por la bonfarto de laborista klaso, ili valoras jarcentojn. En ĉiu etapo de tiu nefacila batalo por la socialismo staris ĉiam unuavice la ĉeĥoslovakaj komunistoj. Same estis en la lastaj kvin jaroj.

Tiun ĉi fakton dokumentis la XVa kongreso KPC, kiu pro sia eksterordinara graveco superis ĉiujn pasintajn. Ĝi pruvis, ke la jaroj post la XIVa kongreso estis la plej sukcesa periodo en la ekonomia kaj politika impeto de nia Respubliko. Estis plenumitaj la ĉefaj taskoj de la ekonomia politiko. Oni atingis altan vivnivelon. Gravajn atingojn notis la scienco kaj tekniko. Plu kreskis klereco kaj kulturnivelo. Evoluus politikmorala konsciigo kaj unueco de la popolo, ĝia socialisma kaj internacisma pensmaniero. Rimarkinde aktivigis la intereso de vastaj popoltavoloj pri estrado kaj administrado de komuninteresaj aferoj. Centmiloj da libervolaj funkciuloj kaj aktivuloj de naciaj komitatoj, de la Nacia fronto kaj al ĝi ligitaj organizaĵoj, kontribuis al plenumo de la programo de la XIVa kongreso.

La XVa kongreso denove klare montris, ke KPC dediĉis en lastaj jaroj multe da energio kaj persisto al la plifirmigo de la internaciaj rilatoj sur la bazo de egalrajteco, reciproka respektado kaj internacisma solidareco. Sur tiu ĉi kampo antaŭstaras ĉiam la sincera amikeco kun ĉiuj socialismaj landoj, unuavice kun Soveta Unio, la garantiante de la sukcesa porpaca batalo, kaj plue kun la landoj liberigantaj de sub la kapitalisma jugo.

KPC ĉiam subtenis kaj subtenas ĉiujn klopodojn de SU haltigi la febran vetkuron en armigado kaj ties proponojn kaj iniciatojn por la tutmonda malarmigo. La ĉeĥoslovaka registaro aktive kunlaboris por la efektivigo de la Tuteuropa konferenco en Helsinki. KPC subtenas ĉiujn ideojn de la paca kunvivado kaj la justan liberigan batalon de la nacioj por la sendependeco, ekonomia kaj socia progreso. Surbaze de tiuj ĉi firmaj starpunktoj la internacia politiko de ĈSSR en la lastaj jaroj konsiderinde plifirmigis kaj ĝia prestiĝo kreskis.

La porpacaĵo ideoj kaj la obstina batalo por ties realigo estas por tiu ĉi politiko tute memkomprenaj, ili ja simbolas esperojn de ĉiuj pacamaj homoj. La batalo por la tutmonda paco ne estos facila ankaŭ venonte, tamen ĉiu sukcesa jaro, ĉiu pozitiva rezulto sociala kaj ekonomia, alproksimigas ties venkon.

La XVa kongreso de KPC aprobis politikan linion por la venonta periodo kaj starigis la programon de plua ekonomia kaj sociala impeto de ĈSSR. Ni firme kredas, ke tiu ĉi kuraĝa celo estos atingita. Ankaŭ la esperantistoj kontribuos per sia oferema laboro, per ĉiuj siaj kapabloj kaj fortoj por la efektivigo de la programo kaj celoj de la XVa kongreso.



František Patera

LA KONFERENCO PRI SEKURECO KAJ KUNLABORO EN EŬROPO. Malgranda gvidilo al la apliko de la Fina Akto de la Konferenco en la laboro de la Esperanto-movado. Eldonis UEA, Rotterdam, febr. 1976 8. pg. Gratulinda eldonaĵo, kiu instigas la Esp. parolantojn agi konforme al la helsinkia dokumento - ĉe la oficialaj instancoj, en partia kaj parlamenta agado ka.

En lia brila interpreto
 poemoj ĉefaj elokventas,
 Miloš Lukáš - la violeto,
 en ombro kaŝe diligentas. * Miloš Lukáš *



Tiel karakterizis K.Kalocsay en siaj Rimportretoj nian faman tradukiston prof.Miloš Lukáš, kiu neatendite forpasis la 26an de aprilo, en la aĝo de 79 jaroj. Esperantisto li fariĝis jam en 1907. Dum nelonga tempo li sin okupis pri ido, sed en la jaro 1912 li definitive redediĉis sin al la movado esperantista. Esperanto multe helpis lin dum la militservo en Graz. M.Lukáš tie konatiĝis kun la eminenta itala esperantisto, d-ro Artur Ghez, laŭ kies iniciato la Katedro de Esperanto en Bologna atribuis poste al lia ĉefa samideano diplomon de honora profesoreco.

M.Lukáš multe tradukadis. Plurajn poemojn kaj prozaĵojn li publikigis en gazetaro kaj en la Ĉeĥoslovaka Antologio. Aparte aperis en 1921 la de li tradukita teatraĵo de J.Vrchlický Nokto en Karlův Týn, prezentita dum la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto en Prago. El la estona li tradukis ĉeĥlingven la nacian eponon Kalevipoeg.

Ĝis la lastaj tagoj de sia fruktodona vivo Miloš Lukáš laboris por la internacia lingvo. Lia lasta laboraĵo estis traduko de la broŝuro pri Ĉeĥoslovakio. La elstara tradukisto forpasis, sed la memoro pri li daŭre restos inter la esperantistoj de Ĉeĥoslovakio. /zm/

FORPASIS ELSTARA TRADUKISTO

SUPER FREŜA TOMBO

Al profesoro Miloš Lukáš

Kiam en naska urbo Liberec
 anis mi ĉe l' rondeto Estontec'
 tiam en jar' mil naŭcentoj dudek tria,
 vi, lingvojn kona majstro poezia,
 glorie laŭrota juna profesor',
 el tiu urbo ĵus jam estis for.

Post jaroj nur mi povis plene sperti,
 kion kapablis talentul' aperti
 el trezorej' de l'naska lingvo kara
 al famili' de lingvo tuthomara,
 kiom da gemoj de la arta dono
 el la parnasa ĉefa reĝokrono.

Kaj nun printempe, kurte post la Pask'
 devis finiĝi tiu nobla task'
 kaj devis ĉesi bati laca koro
 en via brust', maljuna profesoro...
 Sed via verk' ne velkos al pere',
 admiron daŭran vekos via kre'.

Jus al mi penso pri l'junaĝ' aperis:
 "Harut kaj Marut" kiam mi parkeris,
 juvelon de la majstro de l'klasiko
 en via artovesta bel', amiko.
 Mi ĵetes kline antaŭ via verko
 kun larm'bukedon ĉi post via ĉerko...

Jiří Kořínek

RONDETA VIVO

O L O M O U C - Solena kunveno okazis de la 65 jara datreveno de la fondiĝo de la grupo, la 11an de majo, inkluzivis informojn pri la asocia kongreso kaj pri la MEM-agado. La kunlaboro kun Distrikta Packonsilantaro estis intertempa renovigita. -Kurso por komencantoj daŭris inter novembro 1975 kaj aprilo 1976, gvidis M. Břehová.

P A R D U B I C E - La LG aranĝis la 22.4. renkontiĝon kun kdo Helmut Fuchs, ano de Internacia komitato de MEM, longjara esp, aktivo en GDR, meritplena membro de Unuiginta Socialista Partio.

P L Z E Ń - Oni plenumis la tutjaran devontigon omaĝe al la XVa Kongreso de KPC en plibonigo de la vivmedio, plantinte 2000 arbojn, kaj en la kolektado de ferforfajloj.

85 vizitintoj spektis ekspozicion de esp. libroj fine de marto. Pri la aranĝo informis la regiona partia ĵurnalo Pravda.

Agrablajn momentojn oni proponas al interesitoj apud la lago Sychrák, proksime de Bor, okcidenta Bohemio. La esperantistoj kunvenos tie inter la 25.-27.6. Fervojestacio Borek u Tachova.

T Á B O R - El la LG-programo ni notis: 7.6. vizito al astronomia observatorio en Sezimovo ústí, 14.6. Letervespero. Planataj kursoj por aŭtuno.

KRONIKO

La 20.6. festis sian 50an vivjubileon Ladislav M r á z e k. La 25.8. 70 jariĝis Ludvík S í t k o, ambau el Pardubice. En Sumperek ĝisvivos la 6.7. sian 75an jaron V á c l a v M ů l l e r.

Forpasis la 29an de februaro Ota G i n z, aĝa 79 jarojn, pioniro de la ĉeĥa movado, kunredaktinto de la fama Ĉeĥoslovaka Antologio. Lia Esp. traduko aperis en Ĉinio kelkaj eldonoj de "Ĉina rideto" de

M. Pujmanová. El E-o en la ĉeĥan lingvon li tradukis "Per aerŝipalo Norda Poluso" de O. Arnesen/1927/. Rimarkinda estis ankaŭ la laboro de O. Ginz sur la organiza kampo.

En Liberec mortis la 21.5. Herbert S c h m i d t, aĝa 69 j., en Kladno V á c l a v S t ř i h a v k a, la 14.5., aĝa 85 jarojn.

Josef Vítek 65-jara

La 29an de majo ĝisvivis sian 65-an jaron Josef V í t e k, emerita instruisto, la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, komitatano de UEA, gvidanto de la Esperantista Grupo de pacdefendantoj en Mělník. J. Vítek aktive laboris kiel komitatano de la postmilita EA ĈSR, per Esperanto prelegvojaĝis en Skandinavio kiel sendito de kulturministerio, post la likvidiĝo de EA ĈSR en 1951 eldonadis Buletanon de EK Praha. En 1955 li estis elektita kiel prezidanto de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista. En la lastaj jaroj precipe kiel prezidanto de ĈEA /ekde 1969/ kaj de ĈSEF Josef Vítek grave kontribuis al plifirmigo de la ĉeĥa movado kaj de ties internaciaj kontaktoj.



INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-LERN-EJO /vd. la fotografajon/ en Bratislava-Ĉervený Kameň gastigos vininter la 15.8. ĝis la 7.11. en 14tagaj kursoj A-D. Kotizo 1300 Kčs. Aligilojn por septembro oni sendu ĝis la 15.7., por oktobro ĝis la 30.7. - al M. Havránek, Plzenská 7, 801 00 Bratislava.

Senkulpigo. La redaktoro kaj la anoj de la redakta rondo senkulpiĝas sin pro malĝustajtoj, kiuj enŝoviĝis en la duan numeron sur la 3a, 12a, 13a kaj 16a paĝoj.

helpu aktivigi nian



medicinistan sekcion!

Medicinista sekcio de Ĉeĥa Esperanto Asocio havas ĉiujn kondiĉojn disvolvi fruktodonan agadon. Perspektivo disvastigi la internacian lingvon inter medicinistoj estas sufiĉe loga. Medicinistoj ĉie en la mondo urĝe bezonas senperan interkonatiĝon, kiu ne estas ebla alie ol pere de la internacia lingvo. Inter la plej elstaraj esperantistoj estis multaj kuracistoj-fakuloj /Kalocsay, Albault, Yagi, Kabe, Schulhof, Černý, Izák, Vaněk, Parma k.a./ Por ni, medicinistoj, estas devontiga jam la fakto mem ke la fondinto estis samprofesulo. Se la medicinistoj internacie uzus ĝin, tio ege helpus al nia afero. Praktika uzo de la internacia lingvo dum kuracistaj kunvenoj kaj kongresoj, ĝia uzo en gazetaro, estus la plej konvinka fakto porties generala disvastiĝo ankau ekster medicinistaj rondoj. Kuracistoj kaj mezdukitaj medicinistoj tre rapide mastras la lingvon jam pro parenceco de la internacia terminaro, kiu estas al ili ĉiuj bone konata.

Nun esperantaj medicinistoj havas eblon uzi la lingvon precipe por kontaktoj kun eksterlandaj samideanoj - samfakuloj. Interŝanĝo de fakaj spertoj, skriba kaj buŝa interŝanĝaj vizitoj de familioj, fakaj ekskursoj kun akompana klarigo de niaj amikoj kaj legado pasiva kaj aktiva, kontribuado al nia modesta bulteno- tiaj estas samtempaj ebloj. Ekde la tempo de nia renkontiĝo en Ostrava 1973 ni ne kapablis aranĝi kvalitan medicinistan kunvenon kun scienca programo precipe pro malgranda intereso de medicinistoj pri ĝi, kvankam en najbara Budapeŝto la medicinistoj multe aktivis. Sed inter la anoj de ĈEA estas multaj kapablaj medicinistoj, kiuj povus helpi al plialtiĝo de la nivelo de niaj kunvenoj kaj de la bulteno " Medicinistaj Informoj "

Tial ni alvokas ĉiujn helpemajn samideanojn kolegojn, kuracistojn, farmaciistojn, bestkuracistojn, flegistinojn, ruĝkruccanojn kaj aliajn medicinistojn al aktiva laboro en nia sekcio. Kuragu sendi viajn instigojn, skribaĵajn kontribuajojn, proponojn ktp. al la redaktoro de Medicinistaj Informoj.

Dro Josef Hradil,

295 01 Mnichovo Hradiště

č. 325

Viciĝu inter pionirojn de la uzo de la internacia lingvo inter medicinistoj! Apudstarantaj medicinistoj, regantaj nian lingvon aŭ interesitoj pri lernando aliĝu al la asocio kaj helpu krei multnombrian kvalitan sekcion, kiu povus atingi rezultojn similajn al tiuj de la aliaj sekcioj!

MUDr J. Hradil,
gvidanto de Medicinista Sekcio
de ĈEA

LA GREKA ANATEMO

de KAROLO PIC

La iompostioma grekigado de Esperanto komencas alporti gravajn mal-avantaĝojn kaj posttreni danĝerajn sekvojn. Unu el la plej ĝenaj rezultatoj de tiu grekigado estas la nekontestebla fakto, ke en Esperanto la grekaj terminoj jam nun formas tute apartan vortaron, fremdan al la cetera materialo de la lingvo. Tio per si mem eble ne estus katastrofo. Sed la grekaj radikoj havas unu malagrablan econ: ili, preskau senescepte, estas homonimoj de la jam ekzistantaj terminoj pure esperantaj. Kaj ĝuste tio estas erariga kaj konfuza. Ĉar sekve de tio en Esperanto nun svarmas paroj da vortoj, kiuj ja same sonas, sed malsame signifas. Kaj ne ĉiam temas nur pri duopoj, sed iam pri triopoj au eĉ kvinopoj: p o l o /naciano - urbo/, a k r o /pikeco - mezurunuo-alta/, g e a /ambaŭsekse - tera/, h o m o /estulo - sama/, t e r m o /banejc-algebra esprimo - varmo/, g r a f o /nobelo - skribaĵo - skribado - skribilo - skribisto/, m e t r o /mezurunuo - mezurilo - subvojo/, b a r o /barilo - premo - vendotablo - drinkejo/, m o n o /valuto - unu/, l i t o /kuŝujo - ŝtono/, g r a m o /pezunuo - skribaĵo/, k r i p t a /tom-bokela - kaŝita/, f a g o /arbo - manĝulo/ ktp. Estas do klare, ke tiamaniere kreiĝas tuta paralela vortaro homonima.

En la latinidaj lingvoj de la okcidenta Eŭropo tiu transprenado ne kaŭzas ekstremajn problemojn, kvankam iagrade ĝi estas ĝena ekzemple eĉ en la angla! Sed la okcidentaj lingvoj kun siaj komplikaj ortografioj kaj kun neregula, altgrade hazarda vortfarado preskau ĉiam scias retrovigi, jen per la modifo de litero /f - ph/, jen per la ŝanĝo de i al y, jen per la aliigo de finaĵo au per alia rimodo. Kontraŭe Esperanto, kies -o, -a, -e estas ja geniaj, tamen samtempe stereotipe senesceptaj, devas ŝerĉi malsamajn solvojn. Nekutime altan homonimecon de la grekaj vortoj en Esperanto kaŭzas krome eĉ tio, ke la esperanta vortaro ne estas elklude nur latinida, sed en konsiderinde alta grado ankaŭ alifonta, nome germandevena kaj parte slavdevena kaj neeuropdevena. Kompreneble lingvo, posedanta m o n o /valuto/, l i t o /kuŝujo/ kaj g r a f o /nobelo/, apenaŭ povas ĝoji pri l i t o g r a f o kaj m o n o l i t o, eĉ se tio donas al ĝi okazon por diversaj amuzaj koincidoj kaj kumpuŝigoj. Ĉar vortludoj kiel "nenifaranta l i t o -grafo" au "malĉasta m o n o - l i t o de putino" ne kapablas kompensi komplikajojn, kiujn la grekdevenaj radikoj kaŭzas. Lau Schwartz "l i t o g r a f o ja estas m e t i i s t o. Nu, lau PIV l i t o g r a f o estas ŝ t o n p r e s a r e p r o d u k t a ĵ o. Sed jam f o t o g r a f o, lau la sama PIV, estas f o t o g r a f a d o, tamen t e l e g r a f o estas jen a p a r a t o, kaj g e o g r a f o refoje "persono". De vorto al vorto g r a f o do trairas la plej nekutimajn metamorfozojn, signifante jen a d o, jen a ĵ o, i s t o au l i o. Sed tio estas nek Esperanto, nek entute literatura lingvaĵo. Tio estas la plej kruda scienca pigino.

Ĉiu fako rajtas havi propran apartan fakan terminaron, eĉ ampleksegan fakan terminaron, sed ĝi ne rajtas havi propran apartan l i n g - v a n s i s t e m o n. Kaj jen pri kio estas la parolo! Mi estas preta akcepti la novismon - g r a f o kondiĉe, ke ĝi havos unu solan difinitan sencion. Mi ne estas preta akcepti novismon, kiu havas kvar malsamajn signifojn. Kaj jen problemo, kiun levas preskau ĉiu gregdevena vorto!

La grekajoj ne estas malbonaj pro tio, ke ili estas novismoj. Ili estas malbonaj pro tio, ke ili estas homonimoj kaj ke ili devenas el tu-

te alia lingvo, do ol la cetera vortmaterialo de Esperanto. Sed ĉefe /kaj ĝuste tiu ĉi manko estas nepardonebla! / ili estas malbonaj por tio, ke ili renversas la esperantan vortfaradon!

Ĉiu vere granda lingvo obeas nur sian propran autonoman sistemon. Se Esperanto tian sistemon ne havus, ĝi estus mizera, inferiora lingvaĉo, prezentanta nenian ajn logikan avantaĝon. Ĉar tiam ĝi ne estus ilo de la sciencoteknika revolucio, sed nura infana ludilo.

Tial ĉia apelado al la severa sistemeco de Esperanto estas samtempe apelado al ĝia pli granda, vera scienceco. Ni fine jam allasu /la sciencistoj tion scias jam tre longtempe/, ke sciencaj terminaroj estas terure nesciencaj, t.e. hazardaj, kriplaj, nelogikaj, kontraudiraj, miselvokaj kaj ofte rekte erarigaj. Tial unu el la lingvistikaj taskoj de Esperanto estos fari ordon ankaŭ en ĉi tiu Augia stalo! Ĉi do devos iniciati la naskigon de nova sciencia disciplino, kies programo estos fine vere scienciĝi la sciencajn terminarojn.

Ne estas sekreto, ke la franca lingvo, kaj krom ĝi ankaŭ kelkaj aliaj grandaj idiomoj de la Okcidento, estas iasense inferioraj lingvoj, kaj pli malpli almozuloj, ĉe kiuj ĉiu vorto venas el alia korto: e a u a q u a t i q u e - h y d r o t h é r a p i e - w a t e r - b a l - l a s t : akvo - akva - akvkuraco - akvoŝarĝo. Simile l' h o m m e - l e s g e n s - h u m a i n - a n t r o p o h a g e : homo - homoj - homa - homangulo^{2/}. Kontraŭe multaj malgrandaj, malrespektataj lingvoj slavaj estas veraj riĉuloj kompare kun ili. Tiel ekzemple la ĉeĥa posedas proprajn, aŭtentajn ĉeĥajn terminarojn botanikajn, zoologiajn, natursciencajn kaj aliajn, kreitajn nur el la propra indigena lingvomaterialo. La francaj fakaj terminaroj, male, estas panoptiko plena de fremdaj monstroj kaj latinigrekaj mumioj.

Tio devenas de tio, ke ekzistas du sistemoj: la unua ŝatas havi tiom da radikoj, kiom da vortoj, la dua ŝatas esprimi multajn ideojn per malmultaj radikoj. La unua sistemo estas disvolvita en la itala, hispana, portugala kaj parte en la franca kaj angla. La dua sistemo regas en plimulto da slavaj, germanaj kaj orientaj lingvoj, en la sanskrita, greka, latina, rusa kaj araba. Por nesperta naivulo la l-a sistemo havigas belan internacian unuformecon. Por sperta lingvisto, male, nur la 2-a sistemo meritus esti adoptita por lingvo memstara, riĉa el sia propra trezoro.

Senĉese oni subnazigas al ni la grekan kaj latinan. Bone! Ankaŭ ni estimas ilin! Sed kial, ĉe Alaho, oni ne allasas al Esperanto la saman, kiun oni tiom admiras ĝuste ĉe la greka kaj latina: ilian autonomecon, ilian klaran internan sistemon, ilian logikecon?

Oni ŝatas argumenti, ke sciencistoj ne povas rezigni pri tiu aŭ alia vorto kaj termino, pri i d i o t i s m o ekzemple. Sed se ĉiuj aliaj parolantoj povis rezigni pri o t e c, V a t e r, f a t h e r, p a - t e r, p e r e, p a d r e kaj ge, volante paroli esperante, ili nun pretas diri p a t r o, tiam ankaŭ la sciencistoj devos rezigni pri i d i o t i s m o kaj kutimiĝi al i d i o m i s m o, ĉar aliel ili trafus en tre danganan kaj apenau kuraceblan mensidiotismon. Sed ĵer refoje ni venas al la popola karaktero de Esperanto, kiu toleras kastojn de poetoj same malmulte kiel kastojn de sciencistoj, kaj religi-ajn kastojn ne pli ol la politikajn. Kaj se tamen ĝi allasas iajn aristokratojn, ĝi allasas nur la aristokratojn de la spirito.

Cetero multaj tre distruptataj "internaciaj" vortoj kiel ekzemple g e o g r a f i o tute ne estas tiom internaciaj, kiom oni ilin deklaras, ĉar ĉiuj vere grandaj lingvoj havas por ili siajn proprajn terminojn, kreitajn el la propra, aŭtenta, indigena lingvomaterialo kiel, senlekto, jen la ĉeĥa, kiu diras z e m ě p i s /laŭvorte: terografio, terpriskribado/, la serba, kiu havas z e m - l o p i s, la germana, kiu uzas E r d k u n d e, kaj kiujn sekvas la sveda j o r d b e s k r i f n u n g,^{4/} la ĉina t i - l i, la rusa z e m l e v e d e n i e kaj aliaj.

Pro tio ekzistas nenia kauzo, ke ankaŭ Esperanto ne havu siajn kri-
m o l o g i o /kriminologio?/, f o r m o l o g i o / morfologio :

preskaŭ balbuta intermiksio !/, t e r o l o g i o /geologio/, s e k -
s o l o g i o /seksuologio ?!/, i n o l o g i o /geneologio/, f r a -
z o l o g i o /frazeologio ?!/, b i r d o l o g i o /ornitologio/, k o r o l o g i o
/kardiologio/, h o m o l o g i o /antropologio/, s k r i b o l o g i o
/grafologio/ same kiel ĝi jam havas s o c i o l o g i o ,
k a r a k t e r o l o g i o , m e t o d o l o g i o ktp.

Cetere tiu ĉi sistemo estus pli oportuna eĉ por la sciencistoj mem,
ĉar la nuntempaj sciencistoj, precipe la pli junaj el ili, kiuj ne
plu traŭris la latinrekan edukadon, ofte mem ne konas la p r e c i -
z a n signifon de tiuj diversaj, ofte pseudaj vortoj, kaj tiom malpli
ilian gustan etimologion tiel ke tiu ĉi demando ne estas plu nur de-
demando de la p o p o l a k a r a k t e r o de Esperanto, sed deman-
do antaŭ ĉio altgrade praktika, pure pragmata, kaj klare kaj evidente
la unua kaj ĉefa demando de la alvenanta sciencteknika revolucio, kiu
tiujn diversajn o r n i t o -, e n t o m o -, k a r d i o -kaj ali-
ajn devos forĵeti kiel nepraktikan balaston de la estinteco, kiel ne-
utilan, mucidan fatrason de la klasika antaŭhieraŭ kaj kiel venenan,
ĝenan heredaĵon de la "obskura mezepoko", kiu volus etendi siajn mal-
lumajn manojn eĉ ĝis la moderna, inĝeniera, maŝinisma nunto.

En la hodiaŭa Esperanto ankoraŭ ĉiam fantomas spiritoj de la mal-
morgaŭo, tiuj diversaj mallumaj fortoj de la pasinteco: senviva aristokratismo, mucida klasikismo de la forintaj epokoj, kaj ĉefe eĉ ia
oblikva pensadmaniero de tre maljunaj homoj. Sed Esperanto estas la
lingvo de la junaj. Kaj la junaj tute ne ŝcias, kial ili diru t e l e -
p a t i o , a n t r o p o m o r f a aŭ k i n o l o g i o , k i a m
ili povas uzi la indigenajn kaj krome eĉ pli kompreneblajn t e l e -
s e n t o , t e l e s e n t a d o , h o m f o r m a kaj h u n d o -
l o g i o , kiuj signifas precize la saman. Kaj ni tute ne parola pri
tio, ke ĉe k i n o - minacas gravaj miskomprenoj, eĉ duboj, nur pro
tio, ke la grekdevena k i n o - signifas jen h u n d o , jen same bo-
ne, k i n e m a t o g r a f o /lau PIV kinoprezentado !?!?. Kio nin
nur reinvitas, ke ni zorge evitadu la grekajn vortojn ĉie, kie tio eblas,
ĉar ili reprezentas konfuzan, nehomogenan, fremdan kaj altgrade
homoniman elementaron, kontraŭan al la spirito kaj klasika leksiko de
Esperanto. Ili reprezentas kvazaŭ alian lingvon. Kaj ke, cetere, la
tiom distrumpetata "internacieco" fakte estas nur senbrida kaj apenau
supervidebla kaoso, pri tio atestas ankau alia tute "internacia"vor-
to b i o g r a f , kiu, ekzemple en la ĉefa, havas precize la saman
signifon kiel la jam citita PIV-monstro k i n e m a t o g r a f o :
kinoprezentado, kinejo.

La Akademio devos do d e c i d i la demandon. Kaj evidente ne su-
fiĉos nur k o n s t a t i kun PIV, ke g r a f signifas jen l/ no-
belon, jen 2/ iston kaj jen 3/ ilon, ĉar tio ja ne estas solvo, sed
eskapo kaj evito, se ne paroli pri tio, ke g r a f signifas eĉ 4/
desegnaĵon, skribaĵon: a ŭ t o g r a f o , kion PIV cetere ĉaste pri-
silentas.

Tamen jen la kaŭzo, kial preskaŭ ĉiam la aŭtentaj, aŭtonomaj espe-
rantaj formoj estas ne nur pli naturaj, sed eĉ pli kompreneblaj kaj
logikaj ol la formoj pseudointernaciaj. Guste tial ekzemple Privat
preferis b e s t o k u r a c i s t o antaŭ v e t e p i n a r o , kaj
i n t e r k o n s e n t o antaŭ k o n v e n c i o ⁵⁷, kaj same tial
e l t i r a ĵ o , eltraho estas pli bona ol a b s t r a k t o , kiu,
tiuce, estas rekte miselvoka kaj erara !

Tamen, komprenu min bone, mi ne rifuzas la grekajn vortojn por
tio, ke ili estas grekaj. Mi rifuzas ilin pro tio, ke ili estas konf-
f u z a j . Mi pretas alasi ilin kiel memstarajn noviamojn. Sed eĉ
kiel novismoj ili spitas la esperantan sistemon. Alivorte: mi ne mal-
akceptas l o g o aŭ g r a f o pro tio, ke ili estas neoficialaj.
Mi malakceptas ilin pro tio, ke ili estas nesistemegeblaj kaj nedifi-
nitaj, ke ili signifas jen v o r t o , jen tute senaverte kaj hazar-
de i n s t r u o , jen p e r s o n o , p r e z e n t a d o , b i l d o , i n s t r u m e n t o . Sed tio estas kaoso, kiun siatempe kriti-
kis jam Zamenhof, deklarante ke en Esperanto tia nacilingva konfuzo

neniam estos ebla. Evidente li mistaksis la samideanojn !

Bedaŭrinde la danĝero estas eĉ pli danĝera. La nacilingvaj kaosoj estas ja nenio kompare kun la kaoso, reganta en Esperanto. Ĉar la nacilingvaj kaosoj estas pli malpli monodevenaj, unudevenaj. La esperanta kaoso estas polidevena, plurdevena. La konfuzo, reganta en la franca, estas esence grekolatina konfuzo. La malordo, reganta en Esperanto, estas obligita, plurplikita kaoso franca, angla, germana, greka kaj latina. Tiel Esperanto ne kontentigas per la greka polio, signifanta urbo. Sed apud Helio polio /Sunurbo/, Akropolio /Alturbo/ kaj nekropolio /morturbo/ ĝi havas eĉ Konstantinopolio, kvankam la sola regula formo devus esti: sed, jen, en Esperanto oni ne scias, kia devus esti la sola regula formo de Konstantinopolo. Ĉar, lau PIV, la unua romia imperiestro, kiu protektis kristanismon, nomiĝis Konstanteno /li nomiĝis Konstantino, sed la franca prononcas ĝin Konstanteno%. Kaj Konstantino, lau la sama PIV, bedaŭrinde estas urbo en Algerio! Do ĉu Konstantenopolo /urbo de Konstanteno, kiu fakte estis Konstantino / aŭ ĉu Konstantinopolo / turka urbo de alĝeria urbo !?!/? La afero estas klara. Konstanteno dankas sian kriplan ekzistadon al la sama inofobio / kiu feliĉe ne estas feminofobio/, kiu pli frue malvirinigris kaj malkastriĝis jam ankaŭ Augustenon.

La aflikta malordo, reganta en esperantaj terminaroj, devenas de tio, ke tiujn terminarojn kreas teknikistoj, do, en la senco de J. Werner, nekompetentuloj, amatoroj, kaj ne lingvistoj. Ĉar, ĉu oni volas aŭ ne volas tion, termino, nomo, vorto ne estas afero teknika, sed lingvistika. Certe teknikistoj rajtas proponadi fakterminojn. Sed aprobadi ilin /t. e. donadi al ili la definitivan, gramatike senriproĉan formon/ povas nur lingvistoj. Tamen ke iam eĉ lingvistoj ne kapablas tion, pri tio pli ol sufiĉe atestas PIV mem, kiu plurloke "eraras" ne prg nesparteco de siaj alte kompetentaj, doktaj kaj ĉiurilate sciozaj aŭtoroj kaj kunaŭtoroj, sed simple nur pro absoluta manko de unuecaj gvidprincipoj. Sed jen ja la naturalismo !

Ĉe tio ne estas sen intereso, ke la skemismaj, raciismaj tendencoj, pri kiuj ni parolas, trovas apogon ĝuste ĉe multaj usonaj profesoroj. Finfine tio estas nur logika. Por la praktikaj, raciismaj usonanoj la praktika, raciisma /t. e. demokrata kaj popola /!/ spirito de Esperanto prezentas nenion fremdan, sed male nur ion jam denaske konatan, intime proksiman kaj tial tute memkompreneblan kaj sendiskutan. Kaj same tial la vera animo de Esperanto apenaŭ volos kompreni la Budapeŝta skolo, kiu ŝatus fari el Esperanto nur ian plian "nacion" lingvon kun ĉiuj meandroj, neregulaĵoj, idiomismoj, esceptoj, kontraŭdiroj, "erargoj" kaj kunplikaĵoj de la ĝentaj lingvoj, do ion rekte kontraŭan al la Zamenhofaj idealoj kaj al liaj originalaj pensoj eldire esprimitaj en lia fama Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia, kaj en la konata alegorio, en kiu la naciajn lingvojn li komparis al riveroj, kaj la Lingvon Internacian al rekta, ingeniere farita kanalo. Zamenhof tiel, iasence, antaŭprenis la modernan epokon, kiu por siaj multaj kaj multnombraj komunikanaloj /radiaj, televidaj, filmaj kaj aliaj/ bezonas eĉ same modernan, alrespondan kaj plene adekvatan kanalon internacilingvan. Tamen en tiu moderna kanalo la malmodernaj neregulaĵaj grekaj vortoj estus nur ĝeno kaj malhelpo !

Aliflanke la greka influo al Esperanto ne estis ĉiam nur negativa. La greka lingvo donacis al Esperanto ĝiajn klasikajn, belajn, melankoliajn j-pluralojn. Ĝi cedis al ĝi eĉ ĝian plej tipan konjunkcion kaj. Sed ĉefe, kaj plej grave, la plej ellaborita lingvo de la antikva epoko profunde influis ankaŭ la esperantan fonetikon. Ĝi donis al Esperanto la grekan muzikan akcenton, surbaze de kiu la esperantaj akcentaj silaboj oni prononcas pli alttone ol la ceterajn, pli malpli same rapide kaj cetere sen ĉiaj ĝenaj trolongigoj. La greka muzika akcento pruntas al

paroladoj en Esperanto karakteron de simfonioj kaj kanzas, ke eĉ tute ordinaraj konversadoj sonas kiel dialogoj de iamaj Olimpanoj. La muzika akcento, tial, ĉiam pli kaj pli komencas bori al si la vojon, kaj de tago al tago akiri novajn kaj pli vastajn terenojn kaj poziciojn. La fonetikon de la lingvo la muzika akcento nepre levas al la plej altaj, artismaj niveloj. Ĝis nun la plej perfektan praktikan realigon kaj esprimon la greka muzika akcento trovis en la modelaj paroladoj kaj prelegoj de Ivo Lapenna ¹¹⁷.

Cetere la "greka anatemo" en Esperanto estas nenio izolata. Ĝi tiriĝas jam ekde la inauguro de tiu ĉi jarkalkulo. Ĉio komenciĝis ankoraŭ en la antikva Romo. La klasika lingvo latina ne havis tro ampleksan vortrezoron. Tial latinaj adjektivoj kiel magnus, summus, gravis, sed ankaŭ puraj aliaj vortoj latinaj estas multsignifaj. La relativa vortara malriĉeco de la latina lingvo estigis, ke la latina volonte depruntadis ĉe la greka. Kaj tio, retere, ne povis ne konduki al impostioma grekigado de la latina. Por tiu grekigado, tamen, ekzistis tute specialaj, alte favoraj cirkonstancoj kaj kondiĉoj. La latina vivo daŭre staris sub laspeca forta greka hipnoto. La greka kulturo subigadis kaj submetadis al si ĉiujn kaj ĉion ĝis tia grado, ke la intima kunvivado de la greka kaj latina en la pli superaj tavoloj de la Roma kaj Romiaj societo estis io absolute ordinara kaj normala. Paroli greke preskaŭ nedisigeble apartenis al la tiama societa bontono. Sed ankaŭ tio, kaj ĉefe tio, forĝis ĉiam pli kaj pli intimajn ligojn inter la greka kaj latina, kaj helpadis al ankoraŭ pli granda dependeco de la latina al la greka. Nu, kaj multajn jarcentojn pli poste ankaŭ la Renesanco alportis al tio unu plian malfruan brikon.

Tamen se tiu ĉi aĝa miskutimo eble havis ian historian pravigon en la antikva Romo aŭ iom eĉ en la epigona Renesanco, ĝi malhavas ĉian ajn pravigon nun. Ĉar hodiaŭ ĝi estas nenio alia ol mucida balasto, kiu al la moderna homo el la sojlo de la sciencoteknika revolucio nur baras kaj obstaklas la vojon supren kaj antaŭen!

Notoj:

- 1/ Raymond Schwartz: Verdkata Testamento, Paris, 1930, La stranga aventuro de grafo Dormanski, pĝ 103.
- 2/ Petro Stojan: Devenokajvivo de la lingvo Esperanto, Flandra Esperanto - Instituto, Brugge, 1953, pĝ 51.
- 3/ Samloke, pĝ 51-52.
- 4/ Samloke, pĝ 54.
- 5/ D-ro Edmont Privat: Esprimo de sentoj en Esperanto, UEA, Genevo, 1931.
- 6/ Vidu la noton 2/ sub La ĉefaj principoj de Esperanto. La fascino per - in' estas tiom forta, ke ĝin kapablas rezisti nek ordinaraj kursanoj, nek eĉ Akademianoj kaj leksikografoj. La vera kaŭzo de tiu fascino estas psikologia, kaj cetere ne estigas ĝin nur -i n'. Ĝi tie manifestiĝas precipe la origina, ĝiskerna, ĉion venkanta aglutineco de la lingvo, kiu per sia hipnota, unika, kunmetada karaktero tuŝas rekte la pli profundajn, subajn tavolojn de la homa psiko ĝuste tial, ĉar ĝi intime respondas al la aglutina, dismetada kaj kunmetada, antaŭ ĉio inĝeniereca, maŝinisma kaj teknika karaktero de la moderna penso.
- 7/ Jan Werner: Neologismofobio kaj amatorismo, Starto 1/1974, Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
- 8/ Pri la problemoj de Internacia Lingvo interesiĝas krome ankaŭ la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio. Sekve de la iniciato de ĝia Prezidiumo, la 21-an de majo 1974 la lingvosciencia sekcio de la Akademio starigis apartan sciencan teamon, kiu havas la taskojn studi: 1/ teoriajn problemojn de helplingvo ĝenerale, 2/ la historion de la sintezado de planlingvoj, 3/ la tipologion de planlingvoj, 4/ la

rolojn de autonomiaj procezoj kaj konscia interveno en lingvaj evoluoj, kaj 5/ la strukturon kaj funkciojn de Esperanto kiel help-lingvo en internacia komunikado /Interlingvistiko en Soveta Unio: Sciencaj esploroj kiel bazo por postaj paŝoj, Esperanto n-ro 6/834, junio 1975, UEA, Roterdamo/.

- 9/ Ankaŭ la Budapeŝta skolo volas, ke Esperanto estu maksimume esprimiva kaj vivanta. Tamen ĝi erare opinias, ke tion oni atingas nur per neregulaĵoj, esceptoj, kontraŭdiroj kaj eraroj, kvankam ĝuste la malo estas vera. "Neregula", t.e. difektita orgeno estas neuz-ebla orgeno. Ĉar la efekton de orgeno ne faras ĝiaj misformitaj, difektitaj mekanismoj, sed nur la amplekso kaj riĉeco de ĝiaj perfekte kaj regule funkciaj registroj /sufiksoj, prefiksoj, kombin-eblecoj ktp./ . Kun e k s k l i u d i kaj i n k l u z i v e oni povas fari nenion. Kun p l i k i kaj k l u d i oni povas pli-ki kaj ludi preskau Baŝajn variaĵojn.
- 10/ L.L. Zamenhof: Originala verkaro, Traktaĵoj, n-ro 2, pĝ 276 - 312, Hirt und Sohn, Leipzig, 1929.
- 11/ Gramofondiskoj: Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna en la inaŭguro de la 49-a Universala Kongreso de Esperanto, Den Haag, 1964, UEA; Kultura valoro de la Internacia Lingvo, Ivo Lapenna; La voĉoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kaj Kia devas esti internacia lingvo por plenumi ĉiam pli afike tiun rolon? Aliaj materialoj: Magnetofona servo de UEA, Akademiano R. Eichholz, 2040 Springbank Rd., Missis-sauga, Ontario, Kanado, L5H 3N6.

MEM peranto

La VII-a Generala Konferenco de MEM /13.-14.7/ en la bulgara urbo Ruse pritraktos la agadon de la lastaj tri jaroj kaj faros la necesajn konkludojn por la venonta aktiveco. La tagordo havas jenajn ĉef-punktojn: Raporto de la Generala sekretario, raporto de la ĉefredakto-ro de Paco, elekto de gvidorganoj por la sekvonta periodo. Estos apro-bitaj dokumentoj, kiuj prezentos al la esp. movado kaj al la eksteres-perantista publiko la pozicion de MEM. Por partopreno en la konferenco estis invititaj ĉiuj membroj de IK MEM.

Sendube la plej bona maniero por preparo de la konferenco estos ak-tiva subteno al la nova Stokholma alvoko de Tutmonda Packonsilantaro. La senpera celo de tiu ĉi kampanjo estas kunvoko de monda konferenco pri senarmigo. La MEM-anoj per sia aktiva helpo povas pozitive argu-menti pri la realigo de la komuna deklaro de MEM kaj TPK subskribita en Moskvo, 1973.



Osmdesát účastníků XIII.semináře mládeže, který se konal ve dnech 7.-9.5.v areálu SET Lančov, vylechlo přednášku gen.tajemníka MEM a místopředsedy ČES Drah. Kočvary Mírové hnutí a esperanto, výklad některých partií z gramatiky esperanta od T.Kiliana a přednášku P.Sittauera o práci s mládeží. Komise pro práci s mládeží ČES posoudila na svém zasedání mj. plán práce na rok 1976, v němž je věnována zvýšená péče nastávajícím pedagogům a propagaci MEM. Komise bude nabádat mladé esperantisty k navazování spolupráce s organizacemi SSM. Je také maximální zájem na rozvíjení spolupráce se slovenskými mládežníky. Důvěrník komise pro zahraniční styky informoval o svém postupu při projednávání vstupu do TEJO. Svým dopisem přihlásil tajemníkovi TEJO B.Cassinimu 731 mladých esperantistů, členů ČES.

Ve spolupráci s MS ČES připravuje komise XIV.seminář v Hranicích na Moravě ve dnech 17.-19.září. Bude to její největší letošní akce.

Al diskuto pri tiu ĉi pripensiga artikolo de nia akademiano Karolo Piĉ invitas la redakcio de Starto. Jen do mia opinio.

La aŭtoro de la artikolo en la 53-a n-ro de Starto prave pledas por la struktura memstareco de Esperanto, kiel ĝin cetero emfazas kaj aprezas en sia apologio dro M.I. Isajev, la estro de la interlingvistika komisiono de la Soveta akademio de sciencoj. Tiu ĉi memstareco kaj algrade sendependa evolukapablo de Esperanto kompare kun t.n. naturalismaj sistemoj kiel ekz. Interlingue, Interlingua estas nepre avantaĝo de Esperanto.

Tamen ni ne ĉarfas forgesi, ke Esperanto estas nek absolute regula, nek absolute logika lingvo, sed prefere prezentas iel kompromisan sistemon kun granda reguleco kaj granda vivanteco. Evoluzervoj ĝiaj prezentas certe ankoraŭ neeluzitajn perspektivojn por la futuro. Zamenhof lasis en la lingvo plurajn neregulaĵojn, kiuj plejparte ne senvalorigas la lingvon. Se li enkondukis ekz. fino anstataŭ malkomenco k. s., tio kompreneble ne ekskludas eblecon uzi tiajn formojn kiel malfino, malkomenco, se ĝi ni volas krei ekz. en poezio nekutiman, surprizan vorton ĉu pro rimo aŭ alielc. Samcele eblas uzi kun prefikso mal- / de iuj malprave kondamnata aŭ suspektata pri nesufiĉa elvokivo / sinonimojn, kiuj dum la pasintaj 50 jaroj en la lingvo enhejmiĝis pro sia praktikeco kaj koncizeco, kiel ekz. kurta, dura, fora k.s. kaj ekuzi malkurta, maldura, malfora por mola, longa, proksima. Sed tiaj formoj pro sia nekutimeco kaj kvazaŭa paradokseco estos aplikataj ĝuste nur tiucele, resp. necesakaze / rimo k.s./.

Per unu ekzemplo el pluraj eblaj mi volas nur diri, ke en la nuna stato de nia lingvo ĉe koncizigado, reduktado kaj "memstarigado" ni devas procedi tre singarde kaj alpaŝi al tio kun granda sentemo. Ĉar alikaze la rezulto ne estus simpligo, "senfrancigo" aŭ senbalastigo de nia vortaro, sed male ni kreus nenecesajn duoblaĵojn kaj nedezirinde do ŝveligus nian radikaron. Ni jam havas tiajn duoblaĵojn: agrikulturo-agrokulturo, hortikulturo-hortokulturo, motociklo-motorciklo k.s.

Do ni unuflanke povas pledi por la senĝene forlaseblaj finaĵoj kaj preferi diskriminaci anstataŭ diskriminacii, autentica anst. autentika, poluo anst. polucio k.s. Aliflanke jam enhejmiĝintaj kaj relative internaciaj eĉ laŭ la regulo 15-a / almenaŭ al anoj de latinidaj, germanaj kaj slavaj lingvoj, / kiel ekskludi, ekskluziva, konkludi, manuskripto, kooperativo / redonebla per kunagadivo / k.c. ne estos el la lingvo ekstermeblaj kaj restos verŝajne de plejparto de la lingvouzantoj preferataj. Volapikeca reduktado de vortoj ĝis preskaŭa nerekonsebleco ne estas defendebla per memstareco de lingvo kaj certe ne estas porpledaĵo de nia akademiismo.

Kompreneble tre ofte oni devas rezervi por la nudigita radiko nuancon semantikan signifon: okupi ekz. havas pli larĝan sencecon ol okupacii / militiste, agrese okupi/. Civilizo eblas anstataŭ civilizacio. Male radiko muz el muziko havas jam diferencon signifog. Vortoj kiel revolucio, matematiko apenaŭ tolerus kurtigon. Kontraŭe taŭgas metropola por metropolitana, Siksta por Sikstina.

Dum ekz. utilas la kurtaj sinonimoj de multuzataj adjektivoj / febla, softa, k.a./, ĝenaj estas pluraj sciencaj terminoj por unusama nocio: norda cervo-rangifero-boaco; kobajo-kavio; kleco-klefo; komputero- komputro-kumputilo k.s. Tio estas vera vortara balasto.

La estonteco montros kien evoluos la internacia lingvo. Koncizeco kaj ŝparo de superfluaĵ vorteroj estos certe unu el la postuloj, precizeco kaj reguleco sendube la dua.

Kiam la lingvo estos parolata de centoj da milionoj kaj gardata de aŭtoritata agiva Akademio, ĝi havos certe jam neelrelegeblan inercion kaj arbitraĵoj kaj malraciaĵ "azorinaĵoj" ĝin ne povos malutili. Nun ni ankoraŭ devas atenti ĝian evoluigon tre senteme kaj kompetente.

Jiří Kořínek

INFORMACE SEKRETARIÁTU

Upozorňujeme zájemce, zvláště pak nové členy svazu, že si mohou zajistit v sekretariátě svazu dopisní papír a obálky s esperantským textem, samolepky s propagačním zaměřením, knihy, odznaky a další esperantský materiál. Vyžádejte si bližší informace o cenách a druzích !

Český esperantský svaz nabízí všem zájemcům v ČSSR dobrý výdělek, mají-li zájem stát se zástupci svazu v otázkách zajištění inzerátů do **STARTA**: Pevný podíl z faktury ve výši 20 % ihned po poukázání částky za inzerát. Jde o legalizovanou činnost. Napište si o bližší informace. Jde i o jedinečnou možnost pro naše MS, pokud chtějí získat svoje prostředky.

Ve druhé polovině tohoto roku převede sekretariát evidenci členů, jejich předplatné i další údaje na děroštitkový systém. Jde o progresivní moderní metody při vyhledávání informací. Je však bezpodmínečně nutné, abyste nepomínali uvádět vždy svoje číslo legitimace. Bez něho by se vyhledávání vaší karty a sdělování či zaznamenávání údajů stalo velmi problematické. Pomozte nám snížit administrativní práce a nezapomínejte i na složenkách uvádět "svoje číslo" členské legitimace svazu !

Všichni zdravotníci i další, kteří se zajímáte o novinky z medicíny u nás i v cizině a navíc máte zájem podpořit ojedinelý odborný tisk tohoto druhu, objednejte si

M E D I C Í N S K É I N F O R M A C E /Medicinstaj Informoj/

Jsou tištěny 4 x ročně jako příloha **STARTA** ve stejné velikosti a úpravě. Počet stran 16, roční předplatné 24 Kčs. Pro zájemce o kompletní ročník **STARTA** máme připravena všechna lonská čísla M.I. za 15,- Kčs.



- kulturní almanach, příloha **STARTA** je k dispozici za roční předplatné 16,- Kčs. Těm, kdož ještě nemají prvé číslo **PANORAMO** 1-2/74 anebo ročník 75, mohou si je ihned objednat /oba ročníky/ za Kčs 25.-

Noví zájemci o předplatné **HEROLDO DE ESPERANTO** pro rok 1977 nechť se přihlásí ihned v sekretariátu svazu.

Již nyní se připravujeme na příští rok, rok plný významných výročí esperantského hnutí. Projednávejte pečlivě svoje plány činnosti tak, abychom je dostali nejdéle koncem srpna do sekretariátu svazu. Všechny turistické akce projednávejte s naší turistickou komisí. Teprve ty akce, které schválí předsednictvo a budou zařazeny do Plánu činnosti svazu, bude možno realizovat.

Ve dnech 14.-17.10. proběhne další seminář pro funkcionáře svazu, vedoucí místních skupin, komisí a sekcí. Již nyní je třeba vybrat příslušné osoby a nahlásit je sekretariátu svazu. Půjde o třídní internátní školení. Ušlá mzda bude na požádání refundována.

Rozhodnutím členské schůze Klubu esperantistů v Praze byl z MS ČES vyloučen Jan Vlasek, Měchenická 2557, Praha 4 pro hrubé a nepodložené napadání činnosti výboru klubu i funkcionářů předsednictva ČES, zejména pak pro finanční ztráty, které způsobil svým jednáním. Všechny naše místní skupiny upozorňujeme, že jmenovanému byla zakázána jakákoliv činnost v rámci svazu.

Mallonge

Prosíme všechny naše individuální členy, pokud je to možné, aby se přihlásili za členy některé z níže uvedených místních skupin MS ČES. Velice by tím zjednodušili práci v sekretariátu svazu - např. při vybírání členských příspěvků. Pokud nemůžete pravidelně navštěvovat schůze MS, většina vydává svoje oběžníky, jejichž prostřednictvím získáte spojení s nimi. Ulehčete nám práci a nahláste, zda jste se rozhodli vstoupit a případně i pracovat v některé z nich. Rádi vám oznámíme přesnou adresu:

Bor u Tachova, Brno, Česká Lípa, Česká Třebová, České Budějovice, Děčín, Gottwaldov, Havířov, Havlíčkův Brod, Herbertice, Hodonín, Hořice v Podkrkonoší, Hradec Králové, Hranice, Humpolec, Cheb, Jablonec nad Nisou, Jaroměř, Karlovy Vary, Kladno, Kolín, Kraslice, Kopřivnice, Kroměříž, Kyjov, Lanškroun, Liberec, Mělník, Městec Králové, Miletín, Frýdek - Místek, Mnichovo Hradiště, Most, Olomouc, Opava, Ostrava, Ostrov n/Ohří, Pacov, Pardubice, Paskov, Písek, Plzeň, Počádky, Polička, Praha, Přerov, Příbor, Příbram, Prostějov, Roudnice n/Labem, Semily, Stonava, Šumperk, Tábor, Teplice, Třebíč, Trutnov, Třinec, Ústí n/Labem, Vsetín, Vyškov, Znojmo, Zámberk, Žďár n/Sázavou.

.....

Nedávno vyšla v SSSR v ruštině útlá knížka, svým významem však velmi důležitá. Pod názvem "Problémy interlingvistiky" a s podtitulem "Typologie a vývoj mezinárodních uměle vytvořených jazyků" shrnuje dodavadní poznatky o interlingvistice. Kniha vzbuzuje značnou pozornost odborníků i laiků, protože se dotýká aktuálních problémů naší doby, informační exploze a rozšiřování mezinárodních styků. Publikace pojednává o metodologické, filozofické, sociologické i lingvistické stránce problému mezinárodního plánovaného jazyka. Knihu vydalo v letošním roce vydavatelství NAUKA a lze si ji objednat prostřednictvím Sovětské knihy, Václavské nám. Praha 1. Vydání publikace je dalším důkazem, že SSSR věnuje značnou pozornost interlingvistice. V úvodu, který napsal M. Isaev zcela jednoznačně zdůrazňuje přednost esperanta před ostatními projekty mezinárodního jazyka.

UPOZORNĚNÍ REDAKCE. Mezi příspěvky, které docházejí Startu, se často vyskytují takové, které po obsahové stránce a zejména pak jazykové stránce nesplňují základní podmínky pro uveřejnění. Kromě toho někteří příspěvatelé piší česky nerespektují pravidlo, že určité rubriky, tématické celky a diskuse jsou a mohou být vedeny jen v esperantu. Jelikož redigování či resp. překlady podobných příspěvků jsou značně pracné, redakce si vyhrazuje právo na podstatné úpravy textu, v krajních případech nebude na ně brát zřetel.

EK LANŠKROUN vydal klubové odznaky v černé a červené barvě. Zájemci se mohou obrátit na adresu: N. Zedníčková 243, 563 Ol. Lanškroun.

A T E N T U !!! Korespondantojn destinitajn por la Esperantista klubo en Praha oni plu sendaŭ al ties adreso /p.k.1069/ kaj ne al la asocia sekretariejo, kiel erare anoncite en la lasta numero.

el eksterlando

USSR-Laŭ la sciigo de N. Andrianova, prez. de la ukraina Esp. komisiono okazis en Poltava tutukrainia Esp.renkontigo -seminario/15.-16.majo/ kun partopreno de pli ol 60 personoj el 10 urboj, venis ankaŭ gastoj el Rostov kaj Voronej. En la sindikata kulturdomo oni interŝanĝis spertojn kaj planis estontajn aranĝojn por 1976.

.....

SORBIT

estas sukeraĵo malriĉa je kalorioj

SORBIT je přírodní sladidlo s nižší kalorickou hodnotou, které má všechny vlastnosti potřebné pro použití v kuchyni jako cukr

SORBIT je vhodný zejména pro přípravu pečiva a moučnicků pro diabetiky

SORBIT je použitelný jako náhrada cukru při udržování vhodné tělesné váhy

SORBIT POMÁHÁ DIABETIKŮM ZPESTRIT SVŮJ JIDELNÍČEK

SORBIT helpas al diabetikoj eĉ por maldikiĝi

**LA
CHE
MA**

PRODUKTAS : LACHEMA n.p. B R N O
uzino 6 en NERATOVICE

Žádejte v prodejnách POTRAVIN, JEDNOT a
DROGERIÍ.

VITANA n.p. BYŠICE, okres Mělník, ČSSR



mi ripozas

KAJ TAMEN
MIA FAMILIO
ĜUE MANGĀS
MI AĈETAS
FINPRETIGITAJN
SUPOJN
NIA PLEJ RAPIDA
KUIRISTO



ODPOČÍVÁM
A STEJNĚ SI MÁ RODINA
POCHUTNÁVÁ
KUPUJI HOTOVÉ POLÉVKY
NÁŠ NEJRYCHLEJŠÍ KUČAŘ



7/84/76